Esperanto servu la pacon!

# AKTUALE

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

№11(26) Novembro 1975

## "NI AGU JE SPIRITO DE HELSINKI" - alvokas la Prezidanto de UEA

La 9-11-an de oktobro esperantistoj de Leningrado akceptis gravajn kaj karajn gastojn - la Prezidanton de Universala Esperanto-Asocio D-ron Humphrey Tonkin kaj lian edzinon s-rinon J.Tonkin.

Vespere la 9-an, en Leningrada Domo de Amikeco okazis esperantista kunsido, kiun gvidis la vicprezidanto de MEM S.N.Podkaminer. La kunsidon partoprenis s-ro H.Tonkin, ano de Moskva Esperanto-komisiono Prof. D.L.Armand, multaj leningradaj esperantistoj kaj reprezentantoj de Tiĥvina E-klubo. Dum la kunsido kun granda intereso estis akceptita la brila elpaŝo de s-ro Tonkin. La Prezidanto de UEA skize priskribis la historion de lia Asocio, ĝian evoluon kaj ĝiajn agadprincipojn, prezentis al la aŭskultantoj la nuntempan organizan strukturon de UEA kaj la konsiston de ĝia Estraro. S-ro Tonkin ankaŭ skizis la perspektivon por evoluo de UEA en la proksima estonto, substrekinte, ke la plej elstaran signifon havas por tio la Dokumento, akceptita en Helsinki. Tiurilate la Prezidanto emfazis:

> "Ni ŝatus atingi situacion, en kiu homoj en ĉiuj landoj povus ĝis maksimumo partopreni la agadon de UEA... Ni esperas, ke en estonteco ni povas fari du aferojn: unue, ke ni povas iamaniere ankaŭ tiujn homojn, kiuj estas ekster la rondo de UEA, kvazaŭ enplekti en la agadon, ĉie, kie tio eblas. Kaj due, ke kunlabore kun la diversaj landoj ni povas ĝuste efektivigi la spiriton de Helsinki en tiu kontekste, ĝuste tiu spirito, laŭ kiu la homaj kontaktoj inter la nacioj estos plifaciligitaj... Ĝi donas al ni ĉarton ĝuste por solvo de kelkaj niaj problemoj, kaj ni, kiel civitanoj de unuopaj landoj, havas certan respondecon interne de niaj eblecoj ĝuste emfazi al niaj gvidantoj la konsekvencojn de tiu Deklaracio en Helsinki.
>
> ...Lastatempe ni emis tion forgesi, ke ekzistas fina celo de nia agado. ...Sed ni devas multe pli klare fronti ĝin; kompreni, kiel aspektos la mondo, kiam Esperanto fine enkondukiĝos. Se ni tion komprenos, tiam ni eble estus en pli bona pozicio por konstrui tiun mondon sen lingvaj problemoj. Kaj se ni sukcesos konstrui tiun mondon, eble la homoj sukcesos alfronti aliujn gravajn mondajn problemojn."

Post s-ro Tonkin la vorton prenis D.L.Armand, kiu rakontis pri la plej gravaj Esperanto-eventoj en nia lando, inter kiu estas fondo la Interlingvistika Komisiono ĉe la Akademio de Sciencoj. La Komisiono preparas nun serion de artikoloj pri interlingvistiko, kiuj estos proksimtempe eldonataj. Sekvis multaj demandoj al s-anoj Tonkin kaj Armand, kiuj respondis ilin detale kaj klare. La kunsido finiĝis per enmanigo de leningradaj suveniroj al la gastoj.

Dum la sekvintaj du tagoj ges-roj Tonkin konatiĝis kun la vidindaĵoj de Leningrado. Ili vizitis Ermitaĝon kaj la Rusan Muzeon, la urbojn Puŝkin kaj Petrodvorec, aŭskultis "Rigoletto"-n en la Opera teatro.

Kelkajn ekskursojn de ges-roj Tonkin partoprenis kiel ĉiĉeronoj kelkaj leningradaj kaj tiĥvinaj E-istoj.

La 11-an vespere okazis la adiaŭo en la Finlanda stacidomo de Leningrado. Lacaj pro tre streĉa programo de la restado en Leningrado, July kaj Humphrey Tonkin tamen gaje subtenis la kantadon de la mastroj. Antaŭ la forveturo s-ro Tonkin diris:"...Ni bone amikiĝis kun diversaj esperantistoj ĉietie en la urbo... Mi esperas, ke en estonteco la kontaktoj inter sovetaj esperantistoj kaj esperantistoj de aliaj landoj fortikiĝos, kaj mi ankaŭ esperas, ke ĝuste UEA povas ion helpi por atingi tion."

A.Kogan, M.Bronŝtejn (Tiĥvin).

RADIOAMATORISMO?-TIO ESTAS SIMPLE!

La nomo de tiu-ĉi artikolo estas prenita ne hazarde. Ja multaj jam delonge aŭdis pri libroj de akademiano Berg, kaj verŝajne multaj legis tiujn librojn. Sed en ĉi-artikolo temos ne pri unuaj paŝoj en la kampo de granda ellerno de radiotekniko. Ne! En ĉi-artikolo temos pri proksimiĝo de diversaj kluboj de Soveta Unio. Kaj vere! Neniu alia rimedo por dezirantaj kluboj povos helpi havi rapidajn kaj oftajn ligojn.

En ĉiuj urboj, kie estas E-klubo, preskaŭ ĉiam estas ankaŭ radioamatora klubo, kaj, certe, ĉe ĝi ĉiam estas komuna radiostacio. En E-klubo ankaŭ estas homoj, kiuj havas ian rilaton al tekniko, kaj tio tute ne signifas, ke oni nepre devas scii la radioteknikon. Necesas nur, ke estu deziranto havi kontaktojn kun aliaj kluboj. Ja en la kluboj estas homoj, kiuj skribas leterojn al aliaj E-grupoj aŭ simple al E-istoj de diversaj urboj. Do, venu tiu homo en la radioklubon, trovu tie la estron de komuna radiostacio kaj diru: mi nenion scias pri la radiotekniko, sed mi deziras esti radioamatoro. Certe, ne timigu la estron, ke vi estas esperantisto (des pli dum la konatiĝo).

Memkompreneble, ke neniu akceptos vin per malfermita brakumo kaj eble eĉ ne permesos alproksimiĝi al radioaparataro. Sed tio ja eĉ ne estas bezonata al vi, por vi sufiĉos, ke vi anoncis vin, memtris vin. Rigardu ĉie kaj ĉion per larĝaj okuloj, palpebrumu, sed ne rapidu foriri, interesiĝu pri ĉio, kion vi vidas ĉirkaŭe, sed atentu la limon de scivolo por ne tedi. Post nemultaj tagoj necesas veni denove. Interesiĝu pri la horaro de la boro de la stacio, eble konatiĝu kun unu-du radioamatoroj, laŭ deziro, eble trovu ian vojon por paroli kun la estro de la stacio mem, kaj tute ne estas bezonate, ke la temo de l' parolo estu pri radio.

Post kelkaj similaj vizitoj al la klubo oni vin akceptos, kiel "sian" homon, kaj vi povos denove paroli pri ricevo de ebleco esti almenaŭ aŭskultanto la eteron. Estu atenta! Strebu kompreni, kion parolas radioamatoroj, sed ne rapidu kompreni, pri kio parolas eksterlandanoj aŭ rusoj kun eksterlandanoj. Aŭskultu dume nur rusajn radioamatorojn, pasos nemultaj horoj, kaj vi rimarkos mem, ke jam komencas kompreni ion el tio, kion vi aŭdas. Sed multon, certe, ne penu ekscii ĉe tiu, kiu al vi permesis sidiĝi apud la radioricevilo.

Mi avertas, ke por ĉi afero necesas havi grandan paciencon.

Post kelkaj similaj aŭskultadoj vi mem komencos ĉion kompreni, pri kio oni parolas en la ĉtero, ekaŭdos, kiom multe da diversaj lingvoj estas en ĝi, kaj al vi fariĝos klare, ke por kompreni ĉion necesas aŭ scii ĉiujn lingvojn aŭ scii iun internacian. Do, ĉar vi jam estas esperantisto, vi scias, ke estus bone, se ĉiuj radioamatoroj parolus esperante.

Memkompreneble, ke por deziranto ellerni ankoraŭ iun alian lingvon, la etero nur helpos. Sed mi denove avertas, ke por ĉio-ĉi necesas pacienco kaj pacienco.

(Estas d a ŭ r i g o t a en sekvaj numeroj.)

G.Jaskov, estro de la Radioamatora fako de SEJM.

## KIEL KOMENCI PORPACMOVADAN AGADON?

Venas multaj leteroj, kies aŭtoroj, plej ofte SEJM-anoj, demandas pri la stato kaj perspektivoj de MEM-laboro en nia lando kaj kiel komenci peresperantan pacagadon. Ĉar la problemo estas ekstreme grava, necesas, ke niaj fortostreĉoj tiu-ĉi-cele estu unukarakteraj kaj plej rapide konduku nin al la celo.

Antaŭe, kelkaj gravaj informoj. La konata Deklaro Romeŝ Ĉandra - Aleksiev, akceptita en 1973 ĝis nun tre malrapide realiĝas, ĉefe pro malsufiĉa agemo de la eksterlandaj E-istoj. Nur iomete pli bone statas la afero en nia lando.

Sovetâa Packomitato (SPK), kiu ĝis nun rifuzadis labori kun E-istoj, sub preteksto, ke pri ĉiuj E-aferoj nialandaj devas sin okupi SSOD, komencis ŝanĝi sian pozicion je pli favora.

Fondiĝo de la pacmovada grupo en la E-Komisiono de SSOD altiris atenton flanke de SPK, kaj estas atingitaj kelkaj modestaj sukcesoj: 1) estas komisiite al funkciulino de SPK k-dino N.A.Smetannikova konstante kontakti kun la pacmovada grupo; 2) estis decidite, ke MEM-materialoj estos publikigataj en la organo de SPK - "XX jarcento kaj paco" kaj reciproke "Paco" publikigos materialojn de SPK. Ni jam sendis al la redakcio de la SPK-revuo la unuan artikolon "Pacmovado kaj Esperanto"; 3) estas projektata prelego pri MEM dum la estrarkunsido de SPK ĉi-novembre. Eble post ĝi efektiviĝos iuj aldonaj aranĝoj; 4) "Sojuzpeĉatj" pligrandigis la abonkvanto por "Paco" ĝis 500 (pasintjare estis 400). Tial la kvanto de abonantoj kreskos je 25%, tio estas bona, sed ankoraŭ malsufiĉa. Ni penis atingi senliman abonrajton, sed ĉi-jare malsukcesis.

Kio do estas farebla de niaj gek-doj surloke?

La Deklaro montras konkretajn direktojn de la agado, sed la efektiviĝo en nia lando estas iom malfacila, ĉar la lokaj packomitatoj kutime ne korespondas senpere kun eksterlando. Tial niaj proponoj organâzi peresperantajn ligojn povas embarasi la packomitatojn kaj trovi negativan rilaton.

Estas necese entrepreni , unue, jenajn paŝojn:

1. Komisii al unu-du spertaj lingve kaj politike k-doj konstante okupi sin per MEM-agado;

2. La elektitoj informu pri siaj adresoj sekretariinon de la pacmovada grupo k-dinon Lusja Medvedeva - 129128 Moskva, pr. Mira, 196, kv. 44.

<u>NOTO.</u>- Tiuj,kiuj ial skribos rekte al SSOD, evitu nomi nian grupon MEM-sekcio de SSOD. Tia ne ekzistas, kaj ĝia mencio elvokas malkontenton ĉe la SSOD-funkciuloj.

3. El viaj eksterlandaj korespondantoj elektu la plej aktivajn kaj progresemajn kaj instigu ilin: a)aktiviĝi ĉe siaurbaj pacorganizaĵoj, proponante kontaktigi ilin kun la sovetia pacmovado; b) sendi al vi informojn, gazeteltranĉaĵojn, fotojn, flugfoliojn pripacmovadajn ktp., tradukadu la alsenditan materialon ruslingven kaj transdonu al viaurba packomitato. Se tiu ne ekzistas, sendu la materialojn al Lusja Medvedeva, kiu kompilos ilin kaj resendos al vi tajpitan resumon. Ricevante similajn materialojn el eksterlando, la packomitatoj volonte transdonados al vi materialojn pri sia agado, kiujn vi denove sendados eksterlanden ktp.; c) instigu viajn korespondantojn aboni "Paco"-n.

4. Regule informadu la pacmovadan grupon pri viaj atingoj, sukcesoj kaj malsukcesoj.

Jen la agadprogramo unuaetape.

Estu energiaj kaj iniciatemaj! Sukceson!

S.Podkaminer (Leningrad).

## DENOVE PRI "SEJM-DELEGITOJ"

Pasis jam preskaŭ jaro, ekde kiam mi aperigis la artikolon "SEJM-delegitoj" (vd. "A"-2(17), p.13). Sed... la reeĥoj al ĝi ege malmultas. Laŭdindaj estas la agoj de la SEJM-reprezentantoj el Soĉi (V.Bespalov) kaj Kiev (M.Lineckij), kiuj tuje sendis al mi la listojn de SEJM-delegitoj por siaj urboj. Poste mi denove tuŝis ĉi-demandon jam dum la SEJM-Konferenco (aŭgusto). Ekde tiam pasis jam du monatoj - kaj denove nur du listoj el la urboj Riga kaj Ivanovo. Kion do pensas la ceteraj? Entute por hodiaŭ SEJM havas siajn delegitojn en la urboj Barnaul, Soĉi, Kiev, Riga, Ivanovo, Vilnius kaj Ĥarkov. Sep urboj el 43 (!) prezentis siajn delegitojn. Kie estas delegitoj de la urboj Moskvo, Leningrad, Taŝkent, Tallin, kiujn plej ofte vizitadas eksterlandanoj? Kiel sin sentas niaj avangarduloj Ufa, Poltava, Klaipeda..., kiuj devas montri al ĉiuj ekzemplon?

Mi ankoraŭ foje petas ĉiujn SEJM-reprezentantojn denove relegi la artikolon kaj sekvi la 27-an decidon de la Konferenco (vd. "A"-8(23), p.107). Ni devas fari ĉion eblan por ĝis la Novjaro mi havu plenan liston de SEJM-delegitoj por ĝin aperigi.

D.Cibulevskij, Unua v/p de SEJM.

## SKIZE PRI SEJM

### Antaŭ ol komenci

Dank' al niaj historiistoj kaj kelkaj veteranoj kun elstara memorkapablo ĉiuj SEJM-anoj eksciis, ke ĉi-aŭtune ilin atendas tre bona dato - 10-jara jubileo de Sovetia Esperantista Junulara Movado.

Dum la antaŭjubilea SEJT-17 la Komitato de SEJM decidis verki pri la temo konvenan prelegon kaj komisiis tiun-ĉi fierindan aferon al mi. Ĉar mi tre estimas disciplinon la taskon mi nepre devas plenumi. Tamen, la tuta materialo pri la SEJM-historio (leteroj, kolekto de "Juna Esperantisto" ktp.) restis en la naskiĝurbo de la aŭtoro. Tial mi petas ĉiujn legantojn akcepti ĉion-ĉi, kaptitan en mia memoro, nekiel historian analizon (venos tempo ankaŭ por ĝi), sed kiel personajn rememorojn, opiniojn kaj konkludojn de SEJM-veteranoj. Eble multaj miaj amikoj ne pri ĉio konsentos kun mi - iliajn rimarkojn kaj konsilojn mi pretas akcepti dum la proksimaj 30 jaroj por uzi en la estonta historia verko pri nia SEJM.

### ĈE LA LULILO

Nin instruas la Regularo, ke SEJM estas formo de kunagado inter junularaj E-unuiĝoj (kluboj, grupoj, sekcioj). Do, la kunagado devenas tutcerte de Esperanto-tendaroj. Ĉu ne en ilia medio ĝermis semoj de SEJM? La Ĉebaltaj Esperanto-tendaroj, elfluintaj el la studentaj kantofestoj en 1959, fiere portis nomon "studenta kaj junulara" ĝis la 7-a tendaro en Latvio (Saulajne, 1965). Altiu tempo jam evidentiĝis, ke la plej multo de la tendaranoj estas homoj tute ne en studenta aŭ junulara aĝo. Grandparte pro tio la tendaraj programoj fariĝis pli kaj pli enuaj por gejunuloj. En 1965 la lastaj faris provon apartiĝi. Tiel okazis, samtempe kun BET en Saulajne, la praulo de SEJT, gaja junulara tendareto en Abeli, "Mozertujo" laŭ la nomo de la organizanto kaj estro Ervin Mozerts el Riga. Ŝajnas, ke ankaŭ tie certiĝis multaj pri neceso de novaj formoj de agado por la nova generacio de sovetiaj esperantistoj.

Oni diras, ke en la fino de la sama jaro e(novembre aŭ decembre) okazis kunsido de la Iníciata grupo, kiun gvidis okulvitroza junulo, sufiĉe aroga por krei ion novan - Anatolo Gonĉarov. Oni ankaŭ rakontas, ke tiu-ĉi kunsido naskis Sovetian Esperantistan Junularan Movadon.

EN PRISMO DE SKISMO

Ho, kompatinda Ervin Mozerts, kiom da riproĉoj kaj fiaj vortoj estis diritaj pri vi post via "Mozertujo". Tamen, pri Anatolo Gonĉarov iuj diras tion ĝis nun. Do viestás nur la unua, kiu akceptis la atakojn de multaj veteranoj de Esperanto-movado, kiuj ekvidis en la apartiĝo de E-junularo nur perfidon de la komuna celo - disvastogon de Esperanto.

Ja ne enuo de la tendaraj programoj kaŭzis la fondon de SEJM. La ĉefaj kaŭzoj por tiu-ĉi evento estis la rapida kreskanta aro de gejunuloj en Esperanto-kluboj kaj nekonveno de la malnovaj agadmetodoj por tiu E-junularo. Rememoru ni la vortojn de Lenin: "Ni devas stari por la organiza memstareco de la junulara unio senkondiĉe..." (PV, vol. 30, p.226).

Ne ĉiuj sukcesis rememori tion-ĉi, kaj en lajaroj 1965-1966 la apero de SEJM kaŭzis en multaj urboj tre streĉajn rilatojn inter junularo kaj veteranoj. Tiutempe en la unua organo de SEJM, "Juna Esperantisto" aperis ankaŭ mia artikolo pri la problemo de "onkloj kaj nevoj" paciga, ĉar en mia urbo tiu problemo forestis: la klubgvidanto kaj la sola veterano A.B.Rogov gratule akceptis apron de SEJM.

Dum la jaro 1966 (mi nomus ĝin ĉu kverelozą aŭ organiza) tamen sukcesis okazi unu tre grava evento - la unua Konferenco de SEJM-Konsilantaro. Ĝi estâs forta puŝo al la laboro. Ĝi ordigis ĉiujn laborojn kaj organizajn principojn principojn de la Movado. Ĝi estis forta puŝo al la laboro. Ĝi lanĉis la oran erаon de disputoj, raportoj, poentoj kaj procentoj, la eraon de iomete teda, tamen nepre bezonata, neevitebla <u>kunordigita</u> Esperanto-agado, ĉar nome organizo ~~ĝ~~ kaj kunordigo de junulara poresperanta laboro estas la ĉefa tasko de SEJM. Pri tio, do, mi rakontos plue.

PRI SEJM-STRUKTURO

La rusa traduko prezentas la titolon "SEJM" kiel "COBET" - Konsilantaro de junularaj Esperanto-kluboj. Tiel ja estas fakte. La gvida kerno de SEJM estas la Konsilantaro. Ĉiun aliĝintan unuiĝon de E-junularo (klubon, grupon, sekcion) prezentas en la Konsilantaro unu persono - la Reprezentanto. Li raportas kaj voĉdonas je la nomo de la prezentata klubo, publikigas informojn pri la loka E-agado kaj ricevas ĉiujn SEJM-informojn, rekomendas partoprenontojn por la junularaj tendaroj, unuvorte, ne restas sen laboro, se emas labori. Krom Reprezentantojn la Konsilantaro enkluzivas la estrojn de la fakoj (pri ili legu sube) kaj anojn de la SEJM-Komitato, kiuj gvidas laboron de la Konsilantaro. La reprezentantoj estas elektataj en kluboj, la fakestroj kaj la Komitato - dum Konferencoj de la SEJM-Konsilantaro.

La Komitaton de SEJM eniras prezidanto kaj vicprezidantoj. Se la titoloj de vicprezidantoj estis jam kelkfoje ŝanĝataj aŭ tute forigataj, la titolo "prezidanto" restas ĝis nun senŝanĝa(kaj ne nur en SEJM). Do, prezidanto estas la plej necesa posteno. Li gvidas tute ĉion, solvas strategiajn demandojn. La kvar uloj, kiuj sukcesis posedi la prezidantan "fotelon" en SEJM, nome, Anatolo Gonĉarov ("Oazo", Barnaul), Vitautas Ŝilas ("Juneco",Vilnius), Boris Kolker (Ufa), Viktoro Aroloviĉ (Moskvo) estas elstaraj personoj en la Esperanto-movado, por ili Esperanto fariĝis serioza malfacila okupo. Ili vere meritas ĉies estimon. La vicprezidantoj plifaciligas la vivon de la prezidanto. Ili okupiĝas pri diversaj partoj de la kunordiga laboro, pri la plej komplikaj aferoj: fakaj, financaj, informaj, renkontiĝaj,

sekretariaj, eksterlandaj. Pri la aferoj mi skribos aparte. Ĉi-loke mi nur menciu, ke SEJM-anoj ne emas longe resti en la Komitato. Meza daŭro de la laboro en la Komitato estas 2-3 jaroj. El la Komitato de la agadjaro 1971-1972, kies konsiston mi havas submane, eniras la Komitaton, elektitan ĉi-jare nur du personoj. Tre peza estas la teko de Komitatano!

FAKOJ VOKAS

La fakoj de SEJM celas pruvi utilon de la internacia lingvo per ĝia praktika aplikado en diversaj sferoj de la homa agado. La ideo de laŭfaka distribuo de la laboro estas tre taŭga por la Esperanto-movado, ĉar la lingvo estas ilo, kiun o n i p o v a s , s e d n i d e v a s uzi en la plej diversaj sferoj. Tamen la fakoj, kiel interklubaj laborgrupoj, okupiĝantaj pri certaj branĉoj de la praktika utiligo de Esperanto, - tiaj fakoj ĝis nun preskaŭ vakas en SEJM. Laboretas nur la homoj elektitaj - la fakestroj. Laboro de ĉiu faka estas grava por SEJM, sed la plej grava fako ĉi-tempe estas la kompatinda Scienc-Teknika, kiu nur en la pasinta jaro ekhavis dignan fakestron - A.Gonĉarov-on. Ŝanĝo de la fakestroj okazis ĉi-jare ankaŭ en aliaj fakoj, estis ŝanĝita ankaŭ la vicprezidanto, respondeca pri faka laboro. Nun li estas ŝi - tre aktiva junulino el Ufa, Nina Ŝvileneva. Ni esperu, ke la menciitaj ŝanĝoj kondukos al ŝanĝoj en faka laboro mem, kaj ne nur esperu, sed helpu al la fakestroj organizi dum 1-2 jaroj plenforte laborantajn grupojn de fakuloj. Eble por tio ni pli alte poentigu kunlaboron en la fakoj? Ja estas bona pruvo por ĉi-tiu rimedo.

PRI UNU RAVA REZULTO DE BONA POENTIGO

Antaŭ kelkaj jaroj la interna informado en SEJM estis la plej granda problemo. "Juna Esperantisto", la bulteno, eldonata tajpe dum la unuaj SEJM-jaroj (1966-1968) estis sufiĉe riĉenhava kaj ludis gravan rolon en firmigo de interklubaj kontaktoj. Tamen ĝi estis tajpata en kelkaj lokoj, do aktualeco de la materialoj kaj la kvalito de la tajpaĵo plene dependis de la tajpista akurateco kaj de lia tajpilo ankaŭ. Foje mi ricevis "JE" kun du-trimonata malfruo kaj apenaŭ kapablis tralegi ĝin.

En la 1969-a jaro la pace forpasintan "Junan Esperantiston" anstataŭis la informkolekto "Akordo". La "Akordo"-periodo (1969-1973) estis la plej terura. Ĉiujn materialojn por "Akordo" devis multobligi la kluboj mem en 50-ekzemplera kvanto. Do la kluboj preferis uzi materialojn jam multobligitajn prese: gazetartikolojn, afiŝojn, invitilojn ktp. Problemaj artikoloj degeneris tute, la informoj post longa vojo "klubo-redaktoro-kompilanto-klubo" estis preskaŭ sentaŭgaj. Por la plej urĝaj informoj oni uzis tiel nomatajn "Ekspres-bultenon". Tiu netolerebla situacio kaŭzis aperon de la vilniusa dusemajna informilo "Kio,kiam,kie". Ĝi enhavis 2-5 liniajn gravajn informojn de la kluboj kaj de la SEJM-Komitato, atingis ĉiujn ĝustatempe kaj estis akceptita kun ravo en SEJM-medio. Tamen por ampleksaj problemaj materialoj kaj modestaj longaj artikoloj pri la vivo de la Ufa E-klubo ĝi ne estis taŭga...

Nun, geamikoj, ni vivas en sufiĉe luksaj informkondiĉoj, ĉar povas kun plezuro legi la bultenon "Aktuale", eldonatan ekde la jaro 1973. Ĝi estas la unua bulteno, kies redaktoro ne sopiras pro manko de materialoj. Ili abundas, kaj la redaktoro povas jam eĉ aĉeti rubujon por forĵetadi artikolojn netaŭgajn. Okazis tio, ĉar por apero de sia materialo aŭtoro devas nur verki ĝin kaj sendi al la redaktoro. Ĉio cetera estas farata jam sen la aŭtoro, por kiu restas nur du la plej agrablaj taskoj: tralegi sian verkon en "A" kaj elkalkuli, kiom da poentoj alportis lia verkado al la klubo. Kaj fakte ĝi alportas multon. Jen - pli ol triono de la ĉi-jaraj poentoj de tiŭvinanoj estas ricevitaj pro artikoloj en "Aktuale". Ĉu malbone? La monata or-

gano de SEJM prosperas, kaj ne malgravas por tio bona poentigo de la aŭtoroj kaj eldonistoj. Do glorataj estu la principoj de materia interesigo - la mova forto ankaŭ por nia neprofitema esperantistaro!

INTERALIE PRI POENTOJ, SED ĈEFE PRI LA KONFERENCOJ KAJ SOCIALISMA KONKURADO

Dum la unuaj SEJM-Konferencoj la poentoj forestis. Ĝenerale, la Konferencoj, kie laŭ la Regularo oni"faras decidojn de SEJM-graveco", estis tre limigitaj tempe, kiam oni aranĝis ilin en kadro de SEJT. Sed venis la jaro 1970, kiam la SEJM-Komitato anoncis la sekvan Konferencon ekster SEJT, kaj tiu okazis en 1971 sur la insulo Ĥortica apud Zaporoĵje. Do, unue, al tiu jaro en SEJM aperis kluboj jam tre bonaj, bonetaj kaj simple aĉaj - ilin oni devás iamaniere distingi. Due, Konferenco ekster SEJT promesis nekutime multan labor- kaj libertempon - ĝin oni devis per io ŝtopi. Tiel aperis ideo: pridiskuti dum la Konferenco la organizon de socialismo konkurado en SEJM. La konferenca now akceptis tion tuj sen diskuto. Poste sekvis tri luksaj tagoj, ĉar la Taksa Demandaro dume forestis, kaj la Reprezentantoj gaje kaj senhonte marĉandis, postulante pro modestaj agoj neimageble altajn poentojn. Finfine la transira premio - Pokalo de Zamenhof estis aljuĝita kaj dum la pluaj tri tagoj la konferencanoj naskis la Taksan Demandaron, kiu prosperas kaj evoluas ĝis nun. Post tiuj agoj ĉiuj facile ekspiris, sed tuj rememoris, ke eĉ ne unu grava demando krom tiu pri la socialisma konkurado estis solvita, tamen la Konferenco jam finiĝis. Venis tiam la konkludo: Konferenco ekster SEJT estas bona afero, la socialisma konkurado estas ankaŭ bona afero, tamen la poentojn oni kalkulu ekster Konferenco. Por tiu celo estis elektita vicprezidanto pri sekretariaj aferoj. (Maljuste! - Rim. de D.Cibulevskij.)

Dum sekvaj jaroj la socialisma konkurado inter la SEJM-kluboj alportis tre agrablajn rezultojn, ĉar eniris la Movadon sankta spirito de la konkurado. La Konferencoj, organizataj antaŭ SEJT kaj liberigitaj de poentokalkulado fariĝis vera gvida kaj kunordiga organo de nialanda junulara Esperanto-movado. Ilustras tion la pli ol 40 gravaj decidoj, akceptitaj dum la lasta IX-a SEJM-Konferenco, kiuj estas riĉa programo de la agado por ĉiu SEJM-ano en la jubilea jaro.

Korekto. Dum la Konferenco enkadre de la Karpatia SEJT elaŭskultinte raportojn pri la kluba agado oni elektis 3 la plej aktivajn klubojn. Ankaŭ tiam aperis la ideo organizi konkuradon, tie oni ankaŭ decidis okazigi Konferencon ekster SEJT. Ĝuste tiel okazis ĉe Zaporoĵje. Antaŭ la Zaporoĵia tendaro ni jam havis Taksan Demandaron (1-an varianton), kaj nur pri unikaj aktivecoj okazis temporaba marĉando. (Rim. de A.Gonĉarov).

KION KOMUNAN HAVAS UEJM KAJ MUEJR?

Krom la Konferenco ĉiujare en SEJM okazas du konferencetoj, kiuj ankaŭ solvas interesajn kaj gravajn demandojn. La konferencetojn aranĝas dum siaj aŭtunaj kaj printempaj renkontiĝoj la Regionoj. Estas konata la fakto, ke la Regionoj de SEJM-aktiveco kreiĝis historie (vd. la Regularon, punkto 8) kaj staras de tiu tempo firme, kiel la Uralaj montoj. Regiono estas kelkiom da E-kluboj, funkciantaj en relativa teritória apudeco. Pro ne tro granda distanco inter la kluboj de Regiono devas esti firmaj pontoj de kunlaboro, komunaj planoj de diversaj interklubaj aranĝoj kaj eĉ Regiona komitato.

Io estas reala. Kaj unuavice la jam menciitaj Regionaj renkontiĝoj. Pli aŭ malpli utilaj kaj interesaj, ili tamen plenumas sian ĉefan taskon: amikigas anojn de la enregionaj SEJM-kluboj. Plenumo de aliuj gravaj taskoj dum RR-oj dependas de la partoprenantoj kaj de la prepariteco de la organizantoj. Iuj regionoj ŝatas laŭtajn titolojn por siaj renkontiĝoj: REVU(!), OSER(!!), CRERR(!!!). Foje ni rimarkas en iuj titoloj klopodon pri apartiĝo: UEJM (aŭ URSA), MUEJR.

Trejnu viajn cerbojn, deĉifrante la titolojn kaj kompatu la ĉebaltanojn, kiuj nomas siajn renkontiĝojn simple kaj kviete: "Ora folio", "Muzo", "Neĝfloketo" k.s. Certe, ĉiu Regiono havas ion krom la Renkontiĝoj. La Centro-Rusia Regiono havas la plej bonajn prelegantojn kaj la prezidanton de SEJM, la Volgo-Urala - korespondan kurson de Kolker kaj vicprezidanton, Ukrainio - la Unuan vicprezidanton, Ĉebalta - viglajn interklubajn kontaktojn kaj vicprezidanton, Okcident-Siberio - la redaktoron de "Aktuale". La Kaŭkazia Regino havas esperon havi ion en estonto, la Mezazia Regiono neniujn esperojn krom G.Gercikov-on el Talgar kaj E.Perwvertajlo-n el Taŝkent dume montras. Ĉu la varmega azia klimato estas tiom malutila por Esperanto?

KELKVORTE PRI KONTAKTOJ

Tamen ĉiu regiono, ĉiu klubo senescepte preskaŭ havas bonegajn korespondligojn kun eksterlandaj amikoj kaj samideanoj. Amikeco inter ĉiuj popoloj per Esperanto - tiun-ĉi sloganon bone pruvas la kelkmila kvanto de korespondligoj kun la eksterlando, registritaj ĉijare laŭ la klubaj raportoj. Estas domaĝe nur, ke la plejmulto de la kontaktoj estas privataj.

Dum la jardeko SEJM konstante zorgis pri starigo de firmaj kontaktoj kun internaciaj kaj diverslandaj asocioj de esperantistoj. Tiuj zorgoj donis jam sufiĉe kontentigajn rezultojn. SEJM-kluboj aktive partoprenas noblan laboron de la Mondpaca Esperantista Movado, kiu estas membro de la tutmonda Packonsilantaro. La sistemo de klubojAmbasadoroj, laŭ kiu fortaj SEJM-kluboj kontaktas kun landaj organizaĵoj de E-junularo, alportis al SEJM ligojn amikajn kun E-asocioj de socialismaj landoj. En la Komitato de UEA kaj TEJO estas jam po unu SEJM-ano. Plioftiĝintaj informoj pri SEJM-aranĝoj en eksterlanda E-preso respegulas la kreskantan intereson al la junulara E-movado en Soveta Unio.

KIEL VI PENSAS? (anstataŭ konkludo)

Kutime en la fino de ĉiu prijubilea artikolo oni faras konkludon kaj prezentas perspektivon por la jubilanto. La plej gravan konkludon, ke Sovetia Esperantista Junulara Movado progresas, jam somere faris la IX-a Konferenco. Pri la perspektivo mi volas demandi miajn legantojn. El amaso de ĉi-temaj demandoj mi elektis nur tiujn, kiuj ŝajnas al mi plej gravaj kaj interesaj. Do, kiel vi pensas?

- Mi intence ne skribis ĝis nun pri kontaktoj de SEJM kun niaj ŝtataj kaj sociaj oficialaj organizaĵoj, ĉar tiuj-ĉi kontaktoj estas la plej grava demando. En diversaj lokoj de nia grandega lando E-kluboj ĉu prosperas kun helpo de la partiaj komsomolaj kaj sindikataj komitatoj aŭ stagnas pro ties rezisto aŭ pasiveco. En la skalo de la tuta SEJM estis multaj provoj montri sin al la oficialaj organizaĵoj. SEJM raportis al la Komitato de Junularaj Organizaĵoj (KMO) ĉe CK de Komsomolo, prezentis sin al la Unio de Sovetaj Asocioj de Amikeco (SSOD), aranĝis leterkanonadon al diversaj eldonaj oficejoj ktp. Ja estas multaj raportindaĵoj: laboro de ĉiu SEJM-klubo baziĝas sur internaciismo kaj pacdefendo, do sendube estas utila por la ŝtato. Tamen la centraj ŝtataj kaj sociaj organizaĵoj ĝis nun ne tre interesiĝas pri tio, ĉar en la ŝtato kaj ekster ĝi ekzistas multaj problemoj pri gravaj ol tiu de la Lingvo internacia. La sola sukceso de SEJM en ĉi-kampo estas fondo de la junulara sekcio ĉe E-Komisiono en Moskvo. Ankaŭ ĝi tamen ĝis nun funkcias nur surpapere. Sed sen subteno flanke de la ŝtato SEJM neniam havos grandan progreson. Kion do ni faru plu por dum sufiĉe mallonga tempo serioze pruvi nian utilon kaj ricevi agnoskon kaj subtenon?

- Partopreno en la SEJM-agado estas libervola kaj hobieca por la plejmulto de junaj esperantistoj. Krom aktivado en SEJM ĉiu havas propran oficon aŭ studokupon, aliajn hobiojn, familiojn finfine. Nuntempe malbonaj oficaj aŭ familiaj kondiĉoj /eĉ bonaj: edz(in)iĝo, patr(in)iĝo/ eĉ la plej ardajn aktivulojn povas igi for de aktiva por-

esperanta agado. La decidoj de la SEJM-Konsilantaro havas rekomendan karakteron rilate la klubojn. Ĉu ni povas en tiuj kondiĉoj serioze paroli pri disciplino en SEJM? Tamen sen disciplino kaj plenumemo de la aliĝintaj kluboj ĉu eblas entute la progreso de SEJM? Ĉi-jare oni provis enkonduki la poentopunojn por la nedisciplinemaj kluboj. Taŭga estas la rimedo, kiel mi jam antaŭe skribis. Sed ĉu sufiĉa?

- La interrilatoj kun veteranoj pli kaj pli progresas. Neniam kaj por neniu estis barita la vojo al kunagado en SEJM nur pro la aĝo. Multaj veteranoj aktive laboras en junularaj kluboj kaj dank' al sia sperto estas bonegaj edukantoj por junaj esperantistoj. Multaj fariĝis subtenantoj de SEJM kaj tiumaniere helpas al la junulara movado. Fortas la rilatoj des pli, ke post la dekjara laboro en SEJM la fondintoj ĝiaj jam mem estas veteranoj. Ankaŭ mi jam eltiris tri grizajn harojn el mia hararo. La tempo kuras. Kaj kun ĝia kuro sonas pli kaj pli laŭte proponoj pri forigo de la litero "J" el la titolo "SEJM". Ĉu endas SEM anstataŭ SEJM? Aŭ eble ne anstataŭ, sed kune? SEM kaj SEJM. Ĝenerale, ĉu havas iun signifon la aĝo de SEJM-aktivuloj por la laborstilo kaj progreso de SEJM?

- Sendube, la bulteno "Aktuale" estas bonega, riĉenhava. Eĉ la Prezidanto de UEA s-ro H.Tonkin, trarigardinte kelkajn numerojn, ekhavis la saman opinion. Tamen ricevinte tiun bonan bultenon, ni por ioma tempo forgesis pri kelkaj avantaĝoj de la antaŭaj informiloj. Kaj nun ĉu ne senteblas manko aŭ malfruado de urĝaj informoj pri ekspozicioj kaj pri abonado, pri festoj kaj renkontiĝoj? Ĉu diversurbaj presitaĵoj pri Esperantaj temoj same bone atingas vin, kiel dum la ekzistado de "Akordo"? Kiel vi imagas modelan informadon en SEJM?

- La E-tendarojn mi menciis antaŭe nur rilate al la fondiĝo de SEJM. Ĉu necesas priskribi tie-ĉi niajn SEJT, kiujn bone konas ĉiu SEJM-ano kaj tre multaj homoj ekster SEJM almenaŭ dank' al la amaso de verkitaj artikoloj pri la temo. Por estonta progreso de junulara E-movado en nia lando SEJT ankaŭ havas elstaran signifon. Tamen, kio estas SEJT por vi persone? Ĉu nur longe atendata renkontiĝo kun bonaj amikoj? Aŭ bona ripozo kaj distro?, edukejo kaj lernejo? Kio mankas al SEJT de via vidpunkto?

- Ankoraŭ unu demando-proponeto. Nuntempe ni povas tutcerte prognozi, kiuj kluboj en sekva agadĝaro okupos la unuajn kvin-sep lokojn en la socialisma konkurado, kiuj ne atingos eĉ la dudekan. Estas tre granda distanco inter fortaj multmembraj kluboj kaj kelkpersonaj grupetoj. Ĉu ni do ne dividu la aliĝintajn klubojn je kategorioj kaj premiu la venkontojn en ĉiu kategorio per valora premio kaj per transiro al kategorio pli supra? Ekzemple: kategorio "A" - la kluboj, ricevintaj dum jaro pli ol 1000 poentojn,; kategorio B - 500-1000; kategorio C - 100-500 poentojn kaj la kandidata kategorio.

La Komitato komisiis al skribi la prijubilean artikolon por tralego dum la aŭtunaj Regionaj Renkontiĝoj. Ŝajne, mi sukcesis ĝin skribi ne pri- sed perjubilea. Do mi postulas nek ĝian nepran voĉlegon, nek respondojn al la demandoj. Tamen se la artikolo ŝajnas al vi utila kaj elvokos ioman diskuton dum renkontiĝoj regionaj aŭ klubaj, mi sentos min plenuminta la taskon.

M.Bronŝtejn (Tiĥvin).

## NUBOJ EN LA LITOVA ĈIELO

(La Redakcio ne estas respondeca pri la faktoj konigataj.)

Diron oni neas - skribo ne pereas.

GVIDU NIN!

La 28-an de aŭgusto 1972 tri aktivuloj: V.Grigaitis (prez. de la E-sekcio ĉe la Litova SOD), A.Vaitilavičius (prez. de ĉe-sindikata E-klubo), V.Šilas (tiam prez. de "Juneco") skribe sinturnis al la

1-a unua sekretario de la Litova KP k-do Sniečkus (nun mortinta) kun peto krei normalajn kondiĉojn por la agado de esperantistoj kaj fortigi la partian gvidadon de E-kluboj. K-don Sniečkus, onidire, lernintan la lingvon en burĝaj prizonoj, la letero preteriris kaj trafis la Propagandan fakon. Tie oni ekinteresiĝis, kie kaj kiom da esperantistoj funkcias, kion ili faras. Siavice oni informis nin, ke en CK regas plej diversaj opinioj; kelkaj miras pri ekzisto de E-kluboj, kelkaj opinias, ke okupiĝo pri Esperanto estas ĉies privata afero. Oni promesis serioze trastudi la aferon kaj akcepti decidon (eble pri fondo de E-asocio!).

Monatoj kuris. Kiam jam printempe k-do Vaitilavičius konsultiĝis pri organizo de BET, vicprezidanto de la Propaganda fako rekomendis "ne organizi la interrespublikan tendaron ĝis oni ne findecidos la statuson de esperantistoj en la respubliko.

Finfine la 28-an de aŭgusto 1973 CKanoj kunsidis. Pri ilia decido neniu bonvolis informi nin. La proksimuman enhavon ni eksciis ĉirkaŭvoje nur post certa tempo... Temis: 1) esperantistoj agas ĥaose; 2)scii fremdajn lingvojn estas pli utile ol tiun E-on; 3) oni devas kontroli funkciadon de E-kluboj.

## NE NIAJ KONKLUDOJ

La decido de CK iris al la 1-aj urbaj sekretarioj, ministroj (nur por tralegi, kun posta resendo!). Ĉiuj ili faris certajn konkludojn. Kiajn? Pri tio, eble, rakontu la ~~fakoj~~ faroj.

En la respublika gazetaro kaj radio malaperis kiu ajn mencio pri E (krom en kelkaj provincaj ĵurnaloj). Oni malpermesis E-kursojn. La nova klerigministro Rimkus kelkfoje rekomendis (nur buŝe!) ne plu instrui la lingvon en mezlernejoj. Malgraŭ tio dank' al la obstino de instruistoj kaj komprenemo de la direktoroj en kelkaj lernejoj la fakultativa instruado ne ĉesis. ~~Pridiskutis la~~

Pridiskutis la decidon ankaŭ la gvidantaro de la Respublika Sindikato kaj decidis siavice: 1)rekomendi al kulturpalacoj anstataŭ la kursoj de la praktike sensignifa lingvo Esperanto organizadi kursojn de fremdaj lingvoj; 2)devigi certajn instancojn trastudi kaj konfirmi la statutojn de du E-kluboj el Vilnius kaj unu el Kaŭnas; 3)komisii al certaj instancoj kontroladi la agadon de la kluboj. Ankaŭ pri ~~la menciita~~ tiu decido (Sekretariaro de sindikata konsilantaro, la 29-n de oktobro, protokolo Nº 26) ni eksciis ĉirkaŭvoje, post kiam tiuj "certaj instancoj" sensukcese provis likvidi la klubojn mem.

## DILIGENTA MINISTRO

Operative produktis sian decidon ankaŭ la ministerio de supera klerigo. La efikon ni eksentis baldaŭ - oni fermis la fakultativon en la Vilniusa pedagogia instituto kaj malpermesis E-kursojn en superaj kaj specialaj lernejoj. La decidon ni kopiis nur nun. Ĝi estas interesa pro la motivado, kaj mi prezentas ĝin plene (trad. el la Lit.).

MINISTERIO DE SUPERA KAJ
SPECIALA MEZA KLERIGO
La 2-an de oktobro 1973
Nr.8-9363

AL REKTOROJ DE SUPERAJ LERNEJOJ KAJ AL
DIREKTOROJ DE SPECIALAJ MEZAJ LERNEJOJ

Dum firmiĝo de niaj kontaktoj kun eksterlando, ĉiam pli grandan signifon akiras la instruado de fremdaj lingvoj. Estas grave, ke la specialistoj preparataj en la superaj kaj mezaj lernejoj scipovu uzi literaturon en fremdaj lingvoj. Kvankam la interesiĝo de junularo pri fremdaj lingvoj kreskas, tamen en la lernejoj oni ankoraŭ ne sufiĉe atentas lernadon de ili. Tro malmultaj gelernantoj lernas la francan lingvon, precipe en la artodirektaj lernejoj. En tia situacio la lernanta junularo unuiĝas en E-klubojn kaj rondetojn, organizas renkontiĝojn, lernas la praktike malgravan lingvon.

La ministerio rekomedas uzi rimedàjn por fortigi la instruadon de fremdaj lingvoj en la amplekso antaŭvidita en la instruplanoj, ankaŭ aktivigi aŭ nove organizi agadon de fremdlingvaj kluboj kaj internaciismaj rondetoj ĉe kulturkluboj, katedroj kaj kabinetoj. Siavice la ministerio ne rekomendas subteni la kelkloke senbezone larĝigatan movadon de la lingvo Esperanto.

Ministro H.Zabûlis.

La stampilo: ronde - Ministerio de supera kaj speciala meza klerigo (litove kaj ruse), meze - kancelario.

DENOVE PRI ESPERANTO, SED KIEL!?

Ĉi-jare la centra litova gazetaro postlonge ekparolis pri E. En la revuo de la kultura ministerio "Kulturaj terenoj", N°2 aperis longa kaj kolera artikolo de R.Mironas "Ankoraŭfoje pri fremdaj lingvoj", plene dediĉita al Esperanto. Nia malnova kontraŭulo asertis: 1)Esperanto ne estas lingvo (unue, verajn lingvojn kreas ne unuopuloj, sed popoloj; due, ĉiu vera lingvo evoluas, dum Esperanto restas senŝanĝa); 2)E ne taŭgas por interkomprenîĝo (en E-kongresoj por tiu celo oni uzas naciajn lingvojn); 3)esperantistoj estas fanatikuloj (ilin ne eblas konvinki, ke la lingvo ne havas estonton); 4)la junularo devas lerni nur naciajn lingvojn (ĉar neniu popolo deziras, ke oni alparolu ĝin en malvarma, rigida Esperanto). Mi aldonu, ke docento Mironas kaj ministro Zabulis estas kolegoj: ili ambaŭ instruas en la Universitato la latinan (!) lingvon kaj ĉi-rilate apartenas al la sama katedro de la franca lingvo...

La redakcio ricevis multajn reeĥojn - skribis ankaŭ neesperantistoj. Petite de ni respondon al Mironas sendis doktoroj de sciencoj D.Armand kaj M.Isaev el Moskvo. Sed la redaktoro ne publikigos ĝin, ĉar, laŭdire, ĝi estas same kolera kaj ne tro scienca kiel tiu de docento Mironas. Aperos eĉ ne unu el apartaj leteroj de esperantistoj, sed respondo de iu litova filozofo, kies ĉefa ideo estas: neniu malpermesas al dezirantaj individuoj lerni Esperanton, sed komprenu, Esperanto ja ne havas perspektivon! devas aperi en la deka numero. Baldaŭ do.

Dumtempe en la vilniusa ĵurnalo "Vesperaj novaĵoj" aperis kurioza publikaĵo de APN, ke iam modan, sed ne vivikapablan Esperanton eble ŝanĝos la nova projekto "Tupal". Oni akcentis, ke nun UEA havas apenaŭ 50 mil membrojn. La novaĵon kapte represis la respublikaj ĵurnaloj "Sovetskaja Litva" kaj "Komjaunimo tiesa". Nun ni ŝvite klarigas al niaj konatuloj, ke pri ankoraŭ nesufiĉa disvastiĝo de Esperanto kulpas ne la lingvostrukturo (ne estas bezono ŝanĝi ĝin), sed ekonomiaj, politikaj kaj psikologiaj faktoroj.

Antaŭ nelonge la organo de la Litova KP ĵurnalo "Tiesa" presis artikoleton pri instruisto K.Lukoŝeviĉius, kiu sukcese uzas Esperanton por siaj profesiaj celoj. Mi volus esperi, ke ĝi aperis ne hazarde.

NI NOM PENSU

Al la CK-anoj ni asertis, ke la stato en aliaj respublikoj estas pli bona ol ĉe ni. Eldonaĵoj de estonoj pledis por ni, sed al ili aŭtoritatis Rusio, kaj ties sole du presitaj politikaj broŝuroj tute ne impresis. Ni penis pruvi nian solidarecon per nia multnombreco: en la respubliko estas minimume 6200 personoj sciantaj E-on kaj ĉ. 600 organizitaj E-istoj. Anstataŭ konkludi pri neceso krei asocion, kelkaj estis, evidente, ŝokitaj, ke sen ilia scio aperis tiom da esperantistoj. Estus tute nature, se ni, "senbenaj", estus dume nemultaj...

La sola manovro, kiu preskaŭ plene sukcesis, estis la statuta: al ĉiuj interesitoj pri klubaj membrolistoj ni ripetadis, ke membrolistojn havas, registras la vizitadon nur du kluboj: tiu de Klaipeda kaj Kedainiai. Vidu, nur ili havas konfirmitajn statutojn, kiuj reguligas, kion la kluboj devas fari kaj povas kaj devigas registradon de la membraro.

Ni lernis, ke estas riske fronti "superulojn" subite, kiam venas iu krizo. Ni devas guti postgute, ke oni kutimiĝu al ni. Kaj turnu ni la atenton ne al nia kvanto, eĉ ne al bonaj intencoj, sed al praktika utiligo de Esperanto (ankaŭ tiu de eksterlandanoj). Tial "Juneco" trovas, kion foj-foje transdonadi al la propaganda fako de la litova CK.

Ŝ.V.

Postskriptum al la artikolo

1. Aperis sciigo en vespera ĵurnalo pri la bonsukcesa "Muzo-75" iom modifita kaj tre mallongigita (tamen!).

2. Finfine en la 10-a numero de "Kulturaj terenoj" aperis respondo al "arda reago de legantoj". En la artikolo "Lingvo kaj mondkompreno" iu nova nia filozofo R.Pavilionis traktas sistemon informacio-signifo-ekkono kaj ĉefine transiras al E-to: Mallonge: ni ne devas atendi tradukadon en E-on de aktuala teknika, scienca, ankaŭ kultura informacio, sed ni devas preni ĝin el la unuaj manoj. E-o reprezentas neniun kulturon, nek hodiaŭan, nek morgaŭan. Tial ĝi ne vastigas la terenon de signifoj. Ĝi estas vere simpla kaj dekoble pli facila ol kiu ajn nacia lingvo (el tio konsistas ĝia popolareco). Ĝia gramatika, leksika kaj sona malriĉeco antaŭkondiĉas primitivecon de la pensoesprimado. Tamen por turismaj celoj kaj simpla korespondado ĝi plene taŭgas.

## OPINIO DE "KROKODILO" PRI SEJT-17

"...La E-tendaro ne plaĉis: oni rigardas la komencantojn kvazaŭ moluskojn, rigardas kvazaŭ ~~kupraj~~ kupraj moneroj kun la sento de "propra respekto". Se oni volas, ke E efektive fariĝu lingvo de granda homamaso, tiam oni ne devas preteriri "krokodilojn" kun trofiera rideto kaj eĉ silente, sed rilati al ili bondezire, kiel instruistoj al lernantoj, interparoli, loĝigi ne en apartajn tendojn, sed kune, por konstanta subteno de la lingva atmosfero.

Interese, kial Kolker povas ion klarigi ruse en ĉeesto de ĉiuj, sed aliuj ne povas (eble timas, ke oni agnoskos ilin nesciuloj)? Interalie, ankaŭ en Esperanto oni povas al "krokodiloj" klarigi tiel, ke ĉio estus klare (kiel ekzemplo - Perevertajlo).

La ritoj, tradicioj estas interesaj. Ne ekplaĉis la bunteco de la publiko (esto de "stultemuloj" simple dirite) kaj tio, ke multe ne ĉiam estas sentate, ke E-tendaro estas amika, solidara renkontiĝo."

El letero de L.Mirgorodskaja (Kujbiŝeva r;).

## KALENDARO DE NACIAJ KAJ INTERNACIAJ FESTOJ KAJ DATREVENOJ

I. INTERNACIAJ FESTOJ KAJ DATREVENOJ

Januaro. La 1-an - Novjara festo.
Marto. La 8-an - Internacia Tago de virinoj.
Aprilo. La 12-an - Tutmonda Tago de aviado kaj kosmonaŭtiko.
La 24-an - Internacia tago de solidareco de junularo (kontraŭ kolonialismo).
La 25-an - Tutmonda Tago de ĝemelaj urboj.
Majo. La 1-a - Internacia Tago de laboruloj.
La 9-a - Tago de la Venko (en 1945 estis venkita la faŝista Germanio).
La 25-a - Tago de liberigo de Afriko.
Junio. La 1-a - Internacia tago de defendo de infanoj.
Julio. La 3-a - Internacia Tago de kooperado.
Septembro. La 2-a - en 1945 finiĝis la 2-a mondmilito.
La 8-a - Internacia Tago de solidareco de ĵurnalistoj.

Oktobro. La 24-a - Internacia Tago de OUN (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj).
Novembro. La 4-a - fondiĝis UNESKO (1946).
La 10-a - Tutmonda tago de junularo.
La 17-a - Internacia tago de studentoj.

II. NACIAJ FESTOJ KAJ DATREVENOJ

Januaro.
1-a - Venko de la kuba popolo; Kuba revulucio (1959).
2-a - Proklamo de sendependeco de Respubliko Sudan (1956).
11-a - Proklamo de Albanía Popola Respubliko (1946).
21-a - Fondiĝis Itala komunista partio (1921).
Februaro.
20-25 - Historia venko de la Ĉeĥoslovaka popolo kontraŭ reakcio (1948).
26-a - Fondiĝis la komunista partio de Novzelando (1921).
27-a - Estis subskribita Kontrakto pri amikeco kaj reciproka helpo inter Sovetio kaj Mongolio (1946). La Kontrakto estis daŭrigita en 1966.
Marto.
1-a - Fondiĝis la Mongola popol-revolucia partio (1921).
18-a - Tago de Pariza Komuno (Francio).
20-a - En Parizo (1956) estis subskribita protokolo pri nacia sendependeco de Tunizio.
Aprilo.
4-a - Tago de liberiĝo de Hungario el-sub el sub la faŝisma jugo (1945). Hungara popola festo.
20-a - En 1876 la bulgara popolo komencis ribeli kontraŭ la turka jugo.
21-a - Fondiĝis Socialista unuiĝinta partio de Germanio (GDR,1946).
24-a - Komenciĝis naci-liberiga ribelo en Irlando kontraŭ la angla imperiismo (1916).
27-a - Proklamo de sendependeco de Sieraleono (1961, ŝt. en Afriko).
Majo.
2-a - Komenciĝis kontraŭfeŭdala ribelo en Bulgario (1876).
8-a - Germanio liberiĝis de la faŝismo (1945).
8-a - Fondiĝis la Rumana komunista partio (1921).
9-a - Ĉeĥoslovakio liberiĝis de la faŝista okupacio (1945); nacia popola festo de Ĉeĥoslovakio.
14-a - Fondiĝis la Komunista partio de Ĉeĥoslovakio(1921).
24-a - Tago de la Slava alfabeto (Bulgario).
30-a - En Ĉinio komenciĝis naci-liberiga movado kontraŭ la anglaj okupantoj (1841).
Junio.
Fondiĝis la Komunista partio de Kanado (1921).
16-a - Fondiĝis la Komunista partio de Kostariko (1931, ekde 1943 - partio Popola avangardo de Kostariko).
Julio.
1-a - Fondiĝis la Komunista partio de Ĉinio (1921).
1-a - La popolo de Alĝerio konkeris la sendependecon (1962).
11-a - Fondiĝis la Unua Popola registaro en Mongolio (1921).
14-a - Ribelinta franca popolo detruis la parizan fortikaĵon Bastilion (1789); nacia festo de la franca popolo.
16-a - Konfirmo de Kontrakto pri amikeco, kunlaboro kaj reciproka helpo inter Sovetio kaj Korea Popol-Demokratia Respubliko (1961).
18-a - Komenciĝis la naci-revolucia milito de la hispana popolo kontraŭ la faŝistaj puĉanoj kaj la italo-germanaj interventoj (1936).
22-a - Tago de rekreo de Pollando. En 1944 komenciĝis liberiĝo de la faŝistaj okupantoj.
26-a - Komenciĝis popola revolucio en Kubo (1953).
23-a - Tago de revolucio en Egiptujo (1952).
30-a - Fondiĝis la Sud-Afrika komunista partio (1921).

Aŭgusto.

1-a - Fondiĝo de la Bulgara komunista partio (1891). Ekde 1903 nomiĝis Bulgara laborista social-demokratia partio (ĝis 1919).
15-a - Koreujo liberiĝis de la japanaj okupantoj (1945).
15-a - Proklamo de la sendependeco de Hindio (1947).
20-a - Fondiĝo de la Komunista partio de Cipro (1926). Ekde 1941 - Progresiva partio de la laborista popolo de Cipro.
23-a - Rumanio liberiĝis de la faŝistaj okupantoj (1944). Nacia festo de la rumana popolo.

Septembro.

2-a - Proklamo de Demokratia Respubliko Vietnamio (1945).
4-a - Fondiĝis la Komunista partio de Belgio (1921).
9-a - Nacia festo de la bulgara popolo - Tago de Venko (1944).
9-a - Proklamo de Korea Popol-Demokratia Respubliko (1948).
15-a - Proklamo de Bulgario popola respubliko (1946).

Oktobro.

1-a - Proklamo de Ĉina Popola Respubliko (1949).
7-a - Proklamo de Germana Demokratia Respubliko (1949).
20-a - Estis liberigita la ĉefurbo de Jugoslavio en 1944(Beograd°).

Novembro.

11-a - Proklamo de sendependeco de Angolo (1975).
26-a - Proklamo de Mongola Popola Respubliko (1924).
29-a - Proklamo de Jugoslavio federacia popola respubliko (1945). Nun - Socialista Federacia Respubliko de Jugoslavio; nacia festo de Jugoslavio.
29-a - Tago de liberiĝo de Albanio (1944) de la faŝistaj okupantoJ.

Decembro.

6-a - Proklamo de sendependeco de Finnlando.
9-a - Proklamo de la sendependeco de Tanzanio (1961).
30-a - Rumanio estis proklamita popola respubliko (1947).

Kompilis D.Cibulevskij (Ĥarkov).

# INFORMOJ * ANONCOJ * PETOJ * SCIIGOJ

## ATENTU, VIZITANTOJ DE MOSKVO!

Pro la riparo en la Kulturdomo de medicinistoj la kunvenoj de Moskva E-klubo estas translokitaj. Provizore ili okazadas ĉiudimanĉe je la 14-16 h. en la Domo de instruistoj ("Puŝeĉnaja ul. 4. Apud la metrostacio "Dzerĵinskaja").

* * *          * * *          * * *

KOREKTO

En "A"-10(25), p.130 (la 5-a linio de malsupre) anstataŭ "Bastonogov J. - Ust-Kamenogorsk, pr. Lenina, 43-53 legu: Bastonogov J. - 492016 U-Kamenogorsk -16, str. Gogola, 18-6.

* * *          * * *          * * *

BARNAUL

Meze de oktobro en Barnaula E-klubo okazis reelekta kunveno. Nun la estraron eniras V.Kazanova - prezidantino, O.Kazanova, N.Stolbun, J.Inoĥodov. Ĉiujn materialojn koncernantajn la klubon kaj kluban agadon bv. sendi al Valentina Kazanova: 656017 BARNAUL-17, str. Papanincev -205, 19.

Ŝanĝiĝis la tago de klubkunvenoj. Nun la kunvenoj okazas ĉiumerkrede ja la 19-21 laŭ adreso: str. Severo-Zapadnaja, 222-42.

* * *          * * *          * * *

RIGA

Por instigi la redakcion de "Sovetskaja Molodjoĵ" al plua aperigo de la E-rubriko, ĉiuj E-istoj estas petataj sendi favorajn recenzojn pri la jam aperintaj artikoloj aŭ prefere sendi diversajn kontribuojn.

Redaktis V.Ebel.    Redakcio: 656099 BARNAUL-99, a.k. 11, "A".

INFORMA FOLIETO DE LA SCIENC-TEKNIKA FAKO DE SEJM

№1 Novembro 1975

## ENKONDUKO

La Scienc-Teknika fako de SEJM unuigas geesperantistojn, laborantajn en scienco aŭ tekniko, kiuj deziras akceli uzon de Esperanto en la scienco. La tasko estas malfacila kaj ĉe la unua vido ŝajnas esti nereala - tiom fortajn poziciojn havas naciaj lingvoj (unuavice la angla). Necesas teorie kaj praktike pruvi al la mondo utilon de E por la scienco. Ĝis nun nur sciencistoj, regantaj E-on, pruvis ĉiu por si mem (sed ne por la cetera mondo) praktikan aplikeblecon de la Lingvo Internacia. Mankas teoriaj laboroj sur ĉi kampo, mankas pruvaj eksperimentoj k.s. Ni devas forigi tiun mankon.

Necesas teknike prepari transiron de la scienco al Esperanto, unuavice ellabori terminarojn, verki sciencajn tekstojn. Tiun laboron povas fari neniu krom ni, esperantistoj sciencistoj.

Ĉiu el sciencistoj estas kutime tre okupata en sia profesia laboro. Necesas konscii: nia laboro sur la kampo de Esperanto en la scienco ankaŭ estas s c i e n c o, ne malpli grava, ne malpli necesa por la progreso de la homaro. Ĉiu el ni trovu almenaŭ iom da tempo por labori en la E-kampo.

En Sovetio troviĝas unu el la plej grandaj taĉmentoj de sciencistoj-esperantistoj. Tiu taĉmento povas efike progresigi la tutmondan laboron por E en la scienco. Pluraj E-istoj jam ion faris por la temo, sed la laboro ilia pasis izolite, foj-foje eĉ paralele. Ni devas koordini nian laboron.

La lernojaro 1975-76 estas, verŝajne, ĉefe organiza jaro por nia kolektivo. Ni devas kolekti ĉiujn fortojn, pesi niajn eblecojn kaj ellabori realan planon de la laboro por la jarkvino 1976-1981.

Ek al la organiziĝo, gekamaradoj!

Gvidanto de ST-fako de SEJM
k-dato de kem. sc. A.Gonĉarov.


## PLANO DE LABORO POR LA ST-FAKO DE SEJM
en la 1975/76-a

1. Kolekti adresojn de sciencistoj-esperantistoj (tutperiode).
2. Fari enketadon inter sciencistoj-esperantistoj.
3. Lanĉi ST-folion en "Aktuale" (novembro 1975).
4. Multobligi la ST-folion por la nemembroj de SEJM.
5. Ekkontakti la ST-sekciojn en Bulgario, Hungario, Pollando kaj Japanio.
6. Prepari liston de terminaroj manuskripte pretaj kaj de la terminaroj prilaborataj nun.
7. Fini rusigon de "Technisches Wörterbuch".
8. Prepari elpaŝon pri la problemo "Esperanto en la scienco" por SEJT-18.
9. Prepari ekspozicion de scienc-teknikaj libroj por SEJT-18.
10. Sendi al "Scienca Revuo" 4 artikolojn.
11. Verki perspektivan planon de la laboro por 1976-1981 jaroj.
12. Fondi medicinan, kemian, matematikan sekciojn ĉe la ST-fako.
13. Komenci SEJM-bibliotekon de faka E-literaturo.

## KRONIKO DE LA ST-FAKO

Estas kolektitaj 57 adresoj de esperantistoj sciencistoj kaj teknikistoj, el ili 49 estas sciencistoj, 8 - inĝenieroj. Ĉiuj el la jam demanditaj 22 personoj pretas labori en kadro de la ST-fako de SEJM (aktive aŭ pasive, laŭ eblecoj). Al la ceteraj la propono partopreni la laboron de la ST-fako venas kune kun la Informa folieto № 1.

A.Gonĉarov.




## ANONCOJ

1. La Terminologia centro de la ST-fako mikrobendigis jam 15 E-terminarojn. La listo de la disponeblaj terminaroj aperos en la ST-folio №2.

A.Kogan (Tiĥvin).

2. Estas abonebla "Scienca Revuo". La abonpagon (7 rb. 50 k. por 6numeroj jare) akceptas Ivan Ivanoviĉ Palkin:
117449 Moskva M-449, ul. Ŝvernika - 7, korpus 3, kv. 44.

Pro granda deficito de papero kaj superŝarĝiteco de presejoj en Jugoslavio "Scienca Revuo" nun aperas kun jara malfruiĝo. La redaktoro de la revuo promesas proksimtempe likvidi la malfruiĝon.

Ноябрь 1975 г.

## ДАНИЯ

С 25 июля по 2 августа в Копенгагене состоялся 60-й Всемирный конгресс эсперантистов, в котором принимали участие более 1200 эсперантистов из 42 стран. В рамках конгресса состоялись обсуждения актуальных вопросов мирового эсперанто-движения, специализированные собрания научных работников, преподавателей, юристов, математиков и другие/всего 77/. Участники конгресса обратились к Совещанию по безопасности и сотрудничеству в Европе с приветственным письмом, в котором обращалось внимание на растущие в мире затруднения вследствие многоязычия и возможности преодоления их с помощью эсперанто. Во время конгресса состоялась встреча представителей социалистических стран и собрание МЭМ/Международный комитет всемирного движения эсперантистов за мир/. На этих встречах высказывались пожелания шире привлекать сторонников мира к работе МЭМ. Единственным рабочим языком конгресса был эсперанто. Послы СССР, Польши, Австрии, ФРГ и других стран приняли своих соотечественников, участников конгресса.

От Советского Союза в работе конгресса принимали участие др. филол. наук проф. Д.Л. Арманд/Москва/ и член Академии наук Армянской ССР др. филол. наук проф. Г.Г. Севак. По просьбе посла СССР в Дании Н.Г. Егорычева всему составу посольства была прочитана лекция о языке эсперанто.

Газ. "Герольдо де эсперанто"/Бельгия/, №12-13, 1975

## ФРАНЦИЯ

20 мая 1975 г. Французскому парламенту был представлен на рассмотрение проект закона о введении факультативного преподавания эсперанто в средних школах. Проект был выдвинут шестью депутатами и 99-ю членами парламента, представителями социалистической и др. партий. Представленная депутатами аргументация подчеркивает, что развитие международных отношений, мировой экономики и расширению политических связей требует разрушение языковых препятствий. После анализа и отказа от возможности решить эту проблему возрождением латыни, применением одного из национальных языков или англо-французского билингвизма депутаты предлагают использование национальных языков в национальных отношениях, а для международных отношений - международный язык эсперанто. Проект закона за №1667, состоящий из 7 параграфов, передан парламентом на рассмотрение Комиссии по культурным, семейным и социальным вопросам.

"Герольдо де эсперанто", №12-13, 1975

## СССР

С 4 по 18 августа в Восточном Казахстане близ города Усть-Каменогорска состоялся 17-й Всесоюзный слет молодых эсперантистов, посвященный 30-летию победы над фашистской Германией. Слет представляли более 200 человек 13 национальностей из 44 городов СССР. В программе слета было обсуждение актуальных вопросов эсперанто-движения в СССР, подведение итогов социалистического соревнования между молодежными эсперанто-клубами СССР. Первые 3 места соответственно заняли э-клубы г. Уфы, Риги, Барнаула. Большое внимание было уделено теме борьбы за мир и роли эсперантистов в этой борьбе. Одним из важных пунктов слета был митинг, посвященный 30-летию славной победы. В течение всего слета функционировали разговорные курсы языка эсперанто. Рабочим языком слета был эсперанто.

В Москве состоялось интервью между председателем Э-комиссии при ССОД, руководителем интелингвистической группы при Академии наук СССР др.филол.наук проф.М.И.Исаевым и корреспондентом журнала "Хунгара Виво"/Венгерская жизнь/ А.Сугар. В своем интервью М.И.Исаев сказал:"Наша интерлингвистическая группа, созданная в 1973г., занимается изучением вопроса международных вспомогательных языков. Мы рассмотрели более 600 проектов языков и языковых систем, выдвигавшихся в качестве международных, среди них были и несколько проектов советских авторов, например, "Этем"/Ekonomi Tempor, Energi, Medi / /. Наша группа пришла к заключению, что из 600 проектов только эсперанто является жизнеспособным и даже совершенным международным языком.

...Начиная с Всемирной встречи молодежи в Москве в 1957г., эсперанто-движение в СССР непрырывно расширяется и именно сейчас находится накануне своего расцвета, ...и уже планируется создание Советской Эсперанто-Ассоциации."

Полностью интервью опубликовано в журнале "Хунгара Виво"/Венгрия/, 1975г., №4, стр. 14-15.

Составил В.Эбель/Барнаул/.

Pri uzo de la informa folieto „Po meridianam esperanto" vidu „A"-10(14), p. 90. – Red.